Bildkarto Balatona
(Balatoni anzix)

Sur sabla bordo de Balatono
etaj piedsignoj de la knabagho.

Surstrate saporoj kaj aromoj:
vanilo,
cinamo,
kariofilo,
chokolado,
karamelo.
Kelkfoje viandosupo,
bakita kokidajho,
salato el kukumo
kun ajlo.
Malvarmeta vinsaporo,
inundanta el fenestroj
de malnovaj keloj.
Sur autuna stratangulo
en la piedsignoj etaj
postrestis
bruna varmeco
de bakitaj kastanoj
kaj knabotimigaj
rememoroj
de nebula parko,
kaj la malhelakva lago.
Krome, la knabaghaj amoj.
Kaj el la turo de chefplaca preghejo
sono de la sonorilego,
vocho de viaj gepatroj,
kiel provizajho al la vojagho.

Su sabla bordo de Balatono
etaj piedsignoj de la knabagho

Rigardu supren !

La suno brile brilegas.

Tradukita de János Ruff